

Annette von Droste-Hülshoff,
 Lastaj vortoj (1)

tradukita de Manfredo Ratislavo

1a traduk-versio

Karuloj, kiam pasis mia
 Spirit', pri mi ne ploru vi;
 Ĉar lumas jen en paco Dia
 Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro
 Memoru daŭre mi pri vi,
 Por viaj vundoj kaj doloro
 Mildigon volas peti mi.

Se nokte perflugilo sia
 Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,
 Ne pensu plu pri tombo mia,
 Vin de l' stelar' salutas mi.²

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-05.15.*

Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)

La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, baumann@droste-gesellschaft.de, www.droste-gesellschaft.de) ne verkita de la poeto mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.

²aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.